
# Novjorka Prismo

Numero 119 Decembro 2002




## *The Esperanto Society of New York invites you to its annual Zamenhofa Festo!*

WHEN: Friday, December 20, 2002, 6:30-9:00 pm



WHERE: United Federation of Teachers
260 Park Avenue South (20th/21st Streets), NYC
Check schedule in lobby for room number



PROGRAM: Buffet dinner! Zamenhofaĵoj! Singing! Fun!
Se vi deziras, alportu viajn rakontojn pri Zamenhof.
(Election of officers for the year 2003 at 7:30 pm)



MENU: Feel free to bring a main or side dish, dessert, or beverage to share. Please call Rochelle F. Grossman at 718-457-1490 to see what we need. ★

## Protokolo de la kunveno de la 15-a de novembro 2002

Je la sepa horo ptm, Tom ECCARDT oficiale malfermis la kunvenon, kiu estas nia cxiu-jara Malfermita Domo. Dek kvin personoj cxeestis, inter ili kvin gastoj: Erik, Jose, Alex, Luis, kaj Rachel. La lingvo uzata dum la plejparto de la kunveno estis la angla.

Rochelle F. GROSSMAN deklamis sian ŝercon pri la patrino de la musoj. La patrino de la musoj scipovas boji kiel hundo por timigi kaj forkurigi la katon, tiel ŝi povas iri al merkato por aĉeti manĝajon por la musidoj. La patrino montras kaj klarigas, ke utilas scii alian lingvon.

Tomaso parolis pri la aferoj farataj de la klubanoj dum la jaro: la kunvenoj, la vizitoj al restoracioj, la tablo ĉe stratfoiroj, la Zamenhofa Festo, la somera pikniko, la someraj renkontiĝoj, la neformalaj renkontiĝoj ĉe Sony Plaza kaj K-Mart, kaj la kurso por komencantoj. Oni menciis, ke Esperanto estas unu el la plej popularaj lingvoj uzataj ĉe la Interreto.

La ĉeestantoj rigardis la vidbendon de Steve Allen kaj Bill Harmon pri Esperanto. Tiuj, kiuj rigardis la vidbendon la unuan fojon, tre amuziĝis.

Ni kondukis la klubajn aferojn en Esperanto. Eŭgeno MARKOV legis la liston de la kandidatoj por la venonta jaro. Krom la posteno de programdirektoro, pri kiu oni ne certas, la nunaj oficistoj restos je la samaj postenoj, se neniu anoncas aliajn kandidatojn, anonco kiu preskaŭ neniam okazas. Tomaso demandis pri volontuloj.

La protokolo de la 15-a de novembro estis akceptata. Rochelle diris, ke elipsoido mankas, kaj la vortoj "ĉe UN" erare aldoniĝis, en la artikolo "Laste Vizitis ĉe UN." Tomaso diris, ke la mencio de la K-Cafe teorie devas ne esti en la kalendara sekcio de la *Novjorka Prismo.*

Pamela LIEBER parolis pri artikolo en anglalingva ĵurnalo "The Onion," intervjuo kun William SHATNER, kiu parolis pri la Esperanto-lingva filmo "Incubus."

Tomaso anoncis, ke la Zamenhofa Festo okazos la 20-an de decembro. Rochelle volis, ke personoj skribu sur listo la aferojn, kiujn ili kunportos.

Post la klubaj aferoj, estis pli da prelegetoj en la angla.

Alex KARKOVSKY parolis pri la historio de Esperanto. Li parolis pri la unuaj parolantoj, la unua Mondkongreso, kaj ankaŭ pri aliaj rilataj aferoj.

Rochelle parolis pri Esperanto en Ameriko. Ŝi parolis pri la unuaj parol-antoj kaj kongresoj en Ameriko, kaj ankaŭ pri aliaj rilataj aferoj.

Stuart GREEN parolis pri Internacia Semajnfino Esperantista en Okemo, Vermont. Li parolis pri la kursoj, la loĝejo, la manĝaĵoj, la prelegoj, la ludoj kaj la aliaj distraj aferoj tie, kaj pri la personoj, kiuj ĉeestis la semajnfinon.

Pamela parolis pri libroj eldonitaj en Esperanto. Ŝi menciis lokojn, kie oni povas trovi kaj pruntopreni aŭ aĉeti librojn kaj muzikajn diskojn en Esperanto.

Nijl BLONSTEIN parolis pri siaj spertoj, farante vojaĝojn tra la mondo, uzante Esperanto. Li menciis la lokojn, kie li ĉeestis kongresojn kaj kursojn. Li ankaŭ menciis, ke oni povas vojaĝi malmultekoste, uzante Pasportan Servon.

Post la prelegetoj, Tomaso oficiale fermis la kunvenon je la naŭa horo ptm. Tuj poste, la plejmulto de la ĉeestantoj iris al la manĝaĵvendejo-picarestoracio "Emma's Dilemma" por manĝi kaj trinki. ★

*Protokolis: Stuart Green*

## Striko?

Se la laborantoj de MTA strikos, por kelkaj homoj estos malpli facile atingi la Zamenhofan Feston. Sed ni povas helpi unu la alian. Se vi havas aŭtomobilon, aŭ se vi profitus de veturigo, bonvolu telefoni al mi ĉe 212-477-6516. Memoru ke, se estos striko, vi verŝajne ne rajtos eniri Manhattan se estos malpli ol kvar homoj en via aŭto. ★


– *Tom ECCARDT*

## IBM Plaza

La unuan de decembro pli malpli sep homoj ĉeestis neformalan kunvenon ĉe IBM Plaza. Oni debatis politikon kaj eĉ teologiecan filozofion. ★

– *Tom ECCARDT*

## Novaj esperantistoj




La komencanta kurso de Esperanto, kiu okazis ĉe 'Ko-Marto,' finiĝis ĉimonate. Dustudantoj, Erik FIGUEROA kaj Eni FERNANDES, finis la kurson kaj ricevis diplomon de la instruisto, Tom Eccardt. Nova semestro esperebIe komenciĝos en januaro 2003. ★

– *Thomas ECCARDT*

## Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj! Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

**Decembro** — **20**

**ZAMENHOFA FESTO**
***Buffet dinner; elections***
*Friday, 6:30 pm*
*at UFT*

**Januaro 2003** — **5**

**Tagmanĝo**
*Dimanĉon, 1:00 ptm*
*ĉe IBM*
(Limdato por kontribuajoj por *Prismo* 120)

**17**

**ESNY KUNVENO**
*Vendredo, 6:30 ptm ĉe UFT*

**United Federation of Teachers (UFT)**
260 Park Avenue South, NYC
(20th/21st Streets), second floor
(check schedule in lobby for room number)

**"IBM" Building Atrium** (antaŭa nomo)
590 Madison Avenue (56th Street) NYC
Street level, in the Atrium




*Rochelle rakontas pri la musoj je la komenco de nia Malfermita Domo.*



Feliĉan Novjaron!

**2003**

## Vivereto de Tomekarto



*Vere kompletigota statuo por la parko*

## Ho Zamenhof

*(laŭ la melodio de O Tannenbaum)*

Ho Zamenhof, ho Zamenhof,
verdegas via lingvo!
Ho Zamenhof, ho Zamenhof,
verdegas via lingvo!
Ne taŭgas nur en okcident' –
prosperas ĝi en orient'.
Ho Zamenhof, ho Zamenhof,
verdegas via lingvo!

Ho Esperant', ho Esperant',
via kreinto saĝis!
Ho Esperant', ho Esperant',
via kreinto saĝis!
La vort-armilon faris li –
por paco nun batalas ni.
Ho Esperant', ho Esperant',
via kreinto saĝis!

Ho Zamenhof, ho Zamenhof,
de vi ni povas lerni.
Ho Zamenhof, ho Zamenhof,
de vi ni povas lerni.
Kompreno viaj kaj esper'
inspiras sur la tuta ter'.
Ho Zamenhof, ho Zamenhof,
de vi ni povas lerni. ★

*Verkis Thomas ECCARDT*

**ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO**
c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

**Prezidanto** Thomas Eccardt (212) 477-6516
**Korespondа Sekretariino** Rochelle F. Grossman (718) 457-1490
**Protokolisto** Stuart Green (631) 751-5683
**Vicprezidanto** Thomas Leong (718) 981-4252
**Kasistino** Sofiya Soskina (914) 738-6084
**Program-Direktoro** Arturo Bonetti (718) 257-6091

**Novjorka Prismo**
Numero 119 – Decembro 2002
ISSN: 1059-5627
http://members.aol.com/novjorka/prismo

**Redaktoro** Jim Medrano (212) 982-5029
**Subredaktoroj** Thomas Eccardt, Nancee Medrano
**Desegnistino** Mary Pulley

Sendu kontribuajojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: medrano@mac.com
© 2002 Esperanto Society of New York